

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

26-a Jarkolekto * Septembro 2010 * N-ro 89

ISSN 1576 - 0618



EL PUERTO DE SANTA MARÍA
kie vino kaj suno kunfandiĝas

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.

Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto

REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.

IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ

REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ

(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: Ángel Arquillos, Julio Herrero,

Fátima Jiménez, Jordi Lietor.

ENHAVO

Raporto pri la 15-a Andaluza Kongreso de Esperanto	3
La Forpelo de la Baptitaj Maŭroj	10
Lingva Angulo	12
Poezio	14
Paĝoj pri Nia Historio	17
Libro-Servo de A.E.U.	20
Novelo.....	21
Pilar Sarasola, Virino kontraŭfluen	23
Internaciaj Esperanto-Asocioj ILERA.....	26
Nova Eldona Projekto de A.E.U.....	28
Krucvortenigmo	29
Humoro	30
Esperanlingva Kurtfilmo en Antekero.....	31
Turismi en El Puerto de Santa María (Kadizo)	33
Andaluza Kuirarto	37
Flamenko.....	39
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	41

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

RAPORTO PRI LA 15a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

Jaeno, 30-a oktobro / 1-a novembro 2010

Jen la unua fojo Esperanto-Kongreso okazas en la urbo Jaeno. De antaŭ kelkaj jaroj la tiea grupeto deziris organizi andaluzian kongreson ĉe la olivarba urbo kaj do, la andaluzia esperantistaro akceptis la inviton de tiu grupo veni en ĉi tiun belegan urbon por paroli esperanton kaj diskuti pri novaj kaj antikvaj projektoj cele la disvastigon de la zamenhofa lingvo en Andaluzio.



Esperantigita *Magdalena Lacerto* utilis kiel simbolo de la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Jaeno

La Kongreso okazis en la Junulara Gastejo de Jaeno, ĉe historia kvartalo, kaj tie la gepartoprenantoj povis ne nur renkontiĝi sed ankaŭ manĝi kaj dormi. Ĉeestis trideko da gesamideanoj de Jaeno, Malago, Sevilo, Kordovo kaj Granado. Ankaŭ kelkaj eksterlandanoj loĝantaj en Hispanio. Bedaŭrinde ne povis ĉeesti samideanoj de Ĉinio kaj Afriko, al kiuj oni invitis prelegi, pro la fakto, ke ili

ne ricevis la necesan vizon de la hispanaj aŭtoritatuloj por veni en Hispanion.

La Kongreson malfermis Ángel Arquillos, prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kaj Jordi Lietor, ĉef-organizanto de la Kongreso. Ángel profitis sian unuan paroladon por memori nian karan jaenan samideanon Alfonso Escamilla Roa (1912-2007). Andaluziaj Kongresoj ne estas fermitaj renkontiĝoj rilate la okazigon de programeroj, do kelkaj el tiuj pripensitaj kaj anoncigitaj foje fine ne okazas kaj male, aliaj ja oni povis esti organizataj. Tio ankaŭ okazis en Jaeno.

Wolfgang Günther, germana esperantisto loĝanta en Alakanto, prelegis pri “Kiosko de Levanto, transdisciplina almanako kun esperanto kiel komuna

Lingvo”. Temas pri regula publikigaĵo temanta pri ekologiaj aferoj, el libera, skeptika kaj interklutura vidpunkto, kie esperanto agadas kiel ponto-lingvo.

Poste, la pola samideano Maciej Jaskot, profesoro pri la pola lingvo ĉe la Universitato de Granado kaj ĵurnalisto de la esperanto-fako de Pola Radio, parolis pri la prononcado en esperanto. Nia lingvo estas simpla kaj facila kaj ĉiuj literoj havas konkretan kaj ĉiaman sonon. Tamen, ĉu temas pri facilaj sonoj? Verdire, la hispanparolantoj kaj ĉefe ni, la andaluzoj, ofte havas problemojn por prononci bone ĉiujn esperanto-sonojn (b/v, h/ĥ, c/z...) Maciej Jaskot donis al ni ĉiuj taŭgan lecionon en sia prelego pri esperanto-prononcado.



Maciej Jaskot prelegis en Jaeno

Julio Herrero Segura, sekretario de Andaluiza Esperanto-Unuiĝo kaj prezidanto de la Malaga Esperanto-Grupo, parolis pri las starigo de la “Andaluza Esperanto-Domo”, temas pri projekto lanĉita de internacia asocio al kiu aliĝis kelkaj malagaj samideanoj celanta aĉeti konstruaĵon en la urbo Malago, kiu povus utili kiel sidejo de la Andaluza Esperanto-Movado. Ja, dum la tuta Jaena Kongreso oni profitis ĉiujn momentojn por pridebati ĉi tiun projekton. La kunveno utilis ne nur kiel diskutejo aŭ prelegejo, sed ankaŭ oni uzis la tieajn rimedojn por prezenti filmojn, tiel, dum la unua tago de la

Kongreso oni projekciis la konatan filmon en esperanto *Angoroj*. Poste, la partoprenantoj en la Kongreso povis vidi, ankaŭ sur la ekrano, la teatraĵon *Budapeŝta Ekzameno*.

Poste, Jordi Lieter, jaena samideano kaj ĉefa organiinto de la Kongreso de Esperanto, prelegis pri la plej abunda kaj fama natura produktaĵo de la jaena provinco: la oliv-oleo. Li prezentis bildaron pri la fabrikado de ĉi tiu produkto, kun la promeso, ke iam estos je la dispo de la esperantistaro ilustrita vortaro de oliv-oleaj produktoj kaj laboroj.



Jaenaj oliv-oleaj botelitoj speciale produktitaj por la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Oni devas elstari la fakton, ke la organizantoj de la Kongreso disdonis al la ĉestantoj boteleton de oliv-oleo kun esperanto-teksto sur la etikedo, do, post la Jaena Kongreso jam ekzistas en Hispanio ne nur esperanta ŝaŭm-vino kaj jereza vino, sed ankaŭ esperanta oliv-oleo. Jordi Lieter ankaŭ havis la eblon montri al ĉiuj gepartoprenantoj la diversajn klasojn de oliv-oleo: *virga*, *ekstra*, *lama*, *rafinita*, ktp, okaze de la vespera vizito al la Palaco Villardompardo, apud la kongresejo, kie ekzistas etaĝo dediĉita al la Muzeo pri Popolaj Artoj, oni povis vidi malsimilajn maŝinojn kaj ilojn por la produktado de la, tiel nomata, *verda oro*.

Post la vizito al la Muzeo okazis promenado tra la stratoj de la plej tipa kaj antikva kvartalo de la urbo. Jordi Lieter montris al ĉiuj belegajn vidindaĵojn de la *Magdalena* kvartalo, inter kiuj oni devas elstari la Arkon de la antikva preĝejo Sankta Laŭrenco. Ni ankaŭ devas diri, ke la organizantoj de la kongreso eldonis du esperantlingvajn turismajn broŝurojn, unu pri tiu tipa kvartalo kaj la alia pri la Jaena Katedralo. La unua tago de la Kongreso finiĝis sabate vespere kun komuna noktomanĝado kaj bierumado ĉe Flamenka Rondo de la urbo.



Nia diligenta kolegaro en trinko-manĝo paca
ne laciĝos! En la Flamenka Rondo de
Jaeno



Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-
Unuiĝo funkciis dum la Kongreso



Jordi Lietor
prelegas pri la
produktado de la
plej grava jaena
riĉaĵo: la oliv-
arba oleo.

La dua tago de la Kongreso estis la dimanĉo 31-a de oktobro. Verdire la organizado de la andaluziaj kongresoj ĉe junularaj gastejoj taŭgas, pro la fakto ke la gepartoprenantoj povas dormi, matenmanĝi kaj manĝi ĉe la sama loko kie oni organizas la prelegojn, ekspoziciojn, debatojn, ktp. Dimanĉe matene Angel Arquillos deklamis poeziojn en esperanto kaj en la hispana lingvojn, li krome klarigis la traduk-sistemon uzitan. Poste José María Rodríguez prelegis pri la Mistera Jaeno: la Sankta Vizaĝo kaj la Belmezaj Vizaĝoj. Jaeno estas mistera tero kaj laŭ nia kordova samideano la parapsikologiaj temoj reale aperis en Hispanio kiam komence de la 7-a jardeko ekaperis en la jaena vilaĝo Belmez de la Moraleda, misteraj vizaĝoj sur la planko de modesta loĝejo.

Post la prelego de nia kordova samideano Julio Herrero prezentis video-filmon pri la movado en la afrika lando Togo, konkrete pri la Gimnazio Zamenhof ĉe la toga ĉefurbo Lomeo. Bedaŭrinde kvin minutojn post la komenco okazis elektra paneo kaj oni devis nuligi ĉi tiun programeron.

Posttagmeze okazis la Ĝenerala Kunveno de Andaluza Esperanto-Unuiĝo. Ĉeestis 16 membroj de la asocio.



José María Rodríguez prelegas pri parapsikologiaj aferoj okaze de la Andaluza Kongreso de Esperanto en Jaeno

Unualoke Angel Arquillos kaj José María Rodríguez parolis pri la nuntempa situacio de la eldonaĵoj de la asocio: *Monate ĉe Vi* kaj *Gazeto Andaluza*. La nuntempa apero de ambaŭ publikigaĵoj estas tute kontentiga kaj nun, post kelkaj jaroj da ne-akurata aperado, finfine en la jaro 2010 *Gazeto Andaluza* tute akurate aperadas kvar-foje en la jaro. La ĉefredaktoro de la revuo eĉ menciis la eblon, ĉu aperigi la revuon unu plian fojon en la jaro, do 5-foje jare, ĉu pligrandigi la enhavon. Luis José Sánchez, kreinto de la nuntempa blogo de AEU, parolis pri la demarŝoj aperigi propran lokon de la asocio en interreto. Post la fino de la kontrakto kun interreta servilo Andaluza Esperanto-Unuiĝo jam ne disponas pri propra TTT-paĝo, anstataŭ tio oni

preferis aperigi blogon kie aperas de tempo al tempo informoj pri esperanto en Andaluzio.

La dua temo de la kunveno estis la projekto prezentita de Julio Herrero rilate la akiron de propra domo por la Esperanto-Movado en Andaluzio. Li sciigis pri la demarŝoj plenumitaj por la ŝerĉado de konstruaĵo en Malago kaj kiamaniere oni povus aĉeti ĝin kun la kunlaboro de la andaluzia samideanaro kaj de internacia E-Asocio kiu sidejas en Svisio. La diskutoj estis longaj kaj foje eĉ akraj kaj fine, la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo decidis ne kunlabori en ĉi tiu projekto, kvankam kompreneble la asocio ne povas malpermesi la aĉeton de propra sidejo en Andaluzio fare de kiu ajn alia esperanto-asocio aŭ propranome de geesperantistoj, tamen AEU ne kunlaboros en tiu projekto sub la kondiĉoj prezentitaj.

Fine oni decidis ne plialtigi la membro-kotizojn por la venonta jaro 2011 kaj okazigi la proksiman Andaluzian Kongreson de Esperanto, jam la 16-an, en la urbo Granado dum la jaro 2011.



Post la kunveno okazis hispanlingva prelego de Antonio Fabián Jiménez, nia aksarkia samideano. Li parolis pri *La Lengua Internacional en la Educación Intercultural* (La internacia lingvo kadre de la interkultura edukado). Antonio Fabián estas gimnazia profesoro pri Historio kaj li laboras cele la enirigion de esperanto kun akademia valoro en la lernejoj kaj universitataj stud-planoj, laŭ la nuntempa hungara modelo. Poste Antonio Fabián mem kaj kelkaj el la junaj membroj de la Aksarkia Grupo de Esperanto, de Vélez-Málaga, ludis teatraĵon pri

amuzaj rakontoj kiuj vigligis la etoson. Fine J.M. Asensio, reĝisoro de kurt-filmoj en Linares (Jaeno), prezentis propran filmon kun subtekstoj en esperanto.

Kvankam unuamomente oni pripensis okazigi la Kongreson nur sabate kaj dimanĉe, lunde la 1-an de novembro, festotago en la tuta lando, kelkaj gepartoprenantoj kiuj ankoraŭ restis en Jaeno, profitis la tagon por ekskurzi al la fama kaj monumenta urbo Baezo, kie ili pasigis tre agrable postkongresan tagon kun komuna tagmanĝo kiel adiaŭo ĝis la venonta jaro en la andaluza urbo Granada.



Jordi Lieter kaj Pablo Foche, jaenaj esperantistoj kaj ĉefaj organizantoj de la Kongreso.



Samideanaro en Baezo

LA FORPELO DE LA BAPTITAJ MAŬROJ 1609

Antaŭ kelke da tempo la Andaluzia Parlamento aprobis la prezenton de peto ĉe la Hispana Parlamento, cele la aprobon de leĝo por rajtigi al la idaro de la hispanaj maŭroj atingi la hispanan civitanecon. Ankoraŭ tiu leĝo ne estas aprobita de la Hispana Parlamento, eĉ ne pritraktita, tamen se tio finfine okazus, granda nombro da tiuj baptitaj maŭridoj loĝantaj nun en Maroko, Alĝerio, Tunizio, Maŭritanio, Malio kaj Turkio povus deveni hispanoj, sed kiuj estis tiuj baptitaj maŭroj?



En la jaro 1566 ĉiuj islamanoj, idoj de tiuj kiuj dum pli ol 7 jarcentoj loĝis ĉe la Ibera Duoninsulo, estis devigataj akcepti la kristanan fidon.

Sur pasintaj numeroj de nia revuo ni jam parolis pri la islamanoj loĝantaj en Andaluzio post la konkero de la Granada regno fare de la Katolikaj Gereĝoj en la jaro 1492-a. Al tiuj islamanoj, kaj al ties idaro, la kristanaj aŭtoritatuloj permesis konservi ilian religion, kutimojn kaj eĉ lingvon. Tamen la afero tute komplikiĝis kiam en la jaro 1566-a la reĝo Filipo la 2-a malpermesis la uzon de la araba lingvo kaj devigis al ĉiuj islamanoj kristaniĝi. Tiuj estis la kaŭzoj de la Alpuhara ribelo inter la jaroj 1568-a kaj 1571-a. Sed fine la kastiliaj trupoj venkis la ribelintajn maŭrojn, kiuj siafoje ricevis la helpon de la nord-afrikaj regnoj kaj eĉ de Turkio.

Fine de la 16-a jarcento, post la ribelo, oni kalkulas, ke loĝis en la tiama Hispanio (tio estas la regnoj de Kastilio kaj Aragono) proksimume

500.000 maŭridoj, tio estas idoj de tiuj islamanoj kiuj restis en la Ibera Duoninsulo post la jaro 1492-a, sed devigitaj jam adopti la kristanan fidon kaj la kastilian lingvon en la jaro 1566, ili ricevis la nomon "baptitaj maŭridoj". Ĉiuj ili loĝis ĉe la nuntempaj provincoj Granado, Almerio kaj Malago, tamen post la ribelo oni devigis ilin marŝi en aliajn lokojn, ĉefe en Aragonon, Valencion kaj Murcion. Pli-malpli ili estis la 5% el la hispana enloĝantaro, kvankaj ĉe kelkaj lokoj, ekzemple en la Valencia Regno, ili estis la triono el la tuta enloĝantaro.

Malgraŭ la fakto, ke ili jam estis venkitaj kaj disigitaj tra la kastilia kaj aragona regnoj, la aŭtoritatoj konsideris ilin kiel danĝeraj rilate la sekurecon de la regno. Tiutempe okazis milito kontraŭ Francio kaj oni timis, ke tiuj baptitaj maŭridoj profitus la forigon de la hispanaj trupoj por lukti kontraŭ Francio, por organizi novan ribelon. Pro tio en la jaro 1609-a, la reĝo Filipo la 3-a aprobis dekreton rilate la devigan forpelson de tiuj baptitaj maŭridoj, kiuj devus forlasi la hispanan teritorion post 7 jaroj.

Unuamomente ne ĉiuj kristanoj aprobis la dekreton, ekzemple la valenciaj nobeloj pensis, ke la forigo provokus ilian ruiniĝon, ĉar tiuj baptitaj maŭridoj estis malmultekostaj laboristoj kiuj krome pagis akurate la devigajn impostojn. Tamen, la reĝo promesis al la nobeloj dividi inter ili la terpecojn kies proprieteo apartenis al la maŭridoj. Oni kalkulas, ke dum tiuj jaroj foriris el Valencio 118.000 personoj, 61.000 el Aragono, 45.000 el Kastilio kaj Ekstremaduro, 16.000 el Murcio kaj 32.000 el Andaluzio. La forpelo estis dolora kaj humiliga, ĉar oni permesis al ili porti nenion, do ili perdis domojn, ter-pecojn kaj siajn personajn posedaĵojn, eĉ oni devigis al ili pagi la vojaĝ-kostojn.

Preskaŭ ĉiuj ili venis en Nord-Afrikon, kie la integriĝo kun la tiea enloĝantaro, kvankam simila rilate lingvon kaj religion, estis malfacila. Sed la problemoj kaŭzitaĵ ĉe la hispanaj regono estis eĉ pli grandaj. En Valencio la laboristaro malaperis, do, la produktado de suker-kano kaj tritiko preskaŭ forgesiĝis. La burĝaro ankaŭ ruiniĝis en Valencio, ĉar tiuj baptitaj maŭridoj ĉesis pagi la monon pruntedonita de ili. Eĉ la kristana Eklezio perdis pro la foriro de tiuj devigitaj kristanoj, ĉar ĝis tiu momento ili pagis impostojn al la religiaj aŭtoritatoj.

Do, ne nur la baptitaj maŭridoj ruiniĝis, ankaŭ tiu forpelo estis ruiniga por la regno, ĉar anstataŭ esti forpelitaj nobeloj, religiuloj kaj ne-laborantaj kavaliroj, oni preferis forpeli laboristojn kaj metiistojn.

Lingva Angulo

Adjektivoj kaj Adverboj apud Verboj

Ofte, kiam oni tradukas rekte el la hispana lingvo en esperanton, ni dubas pri la korekta uzo de adjektivoj kaj adverboj apud verboj. En la hispana lingvo, sur la ekzempla frazo *Es bueno caminar una hora por la mañana*, ne ĉiuj scias, ke tiu vorto *bueno* estas adverbo kaj pro tio oni erare pensas kelkfoje ke ĝi povas esti adjektivo, kiu ankaŭ en la hispana lingvo estus *bueno*. Tiu konfuzo en la hispana lingvo povas kaŭzi la ne-ĝustan uzadon de adjektivoj kaj adverboj apud verboj kiam ni parolas aŭ skribas en esperanto.

Unue, ni devas memori, ke la vorto *adverbo* jam indikas al ni kie uzi ĝuste ĝin, tio estas, apud la verbo. Do, se oni parolas pri verbo ni devos uzi adverbeton, kaj se ne temas pri verbo ni uzos adjektiveton. Ni vidu la ekzemplan frazon: *Es bueno caminar una hora por la mañana*. Kaj ni devas demandi al ni mem... kio estas bona? La respondo estas *caminar ...*. Do, ni devos uzi adverbeton. Tiel la ĝusta traduko estus: *Estas bone promenadi unu horon dum la mateno*, neniam ni devus diri... *estas bona promenadi...* ĉar ni devas uzi adverbeton anstataŭ adjektivo se temas pri akompani verbon.

Ni vidu pliajn ekzemplojn:

- *Es inteligente escuchar a los demás.*

Ni povas demandi al ni mem, kio estas inteligenta? *Escuchar...* do temas pri verbo, ni uzu adverbeton.

La traduko estus: *Estas inteligente aŭskulti la ceterulojn.*

- *No comer demasiado es aconsejable.*

Kio estas konsilinda? Ne manĝi ... do, temas pri verbo.

La traduko estus: *Ne manĝi tro multe estas konsilinde.*

Sed, kio okazas en frazoj similaj al ĉi tiu?

Es una cuestión inteligente leer muchos libros.

Ni denove uzos mem-demandon. Kio estas inteligenta? La respondo estas: "Una cuestión". Do, en ĉi tiu frazo "*inteligente*" ne akompanas al verbo legi sed al substantivo "afero". Ni uzos adjektiveton se ni tradukas la frazon en esperanton: *Estas inteligenta afero legi multajn librojn.*

Same okazas se ni diras: *Es una cuestión aconsejable dormir ocho horas*. Se ni mem-demandas.... Kio esas konsilinda? La respondo estas “*una cuestión*”, do ni traduku: *Estas afero konsilinda dormi ok horojn*. Se ni demetas la vorton “*afero*”, tio kio estas konsilinda estus *dormi*, do ni uzus adverbon anstataŭ adjektivon: *Estas konsilinde dormi ok horojn*.

Jen pliaj ekzemploj:

- Estas konvene uzi la parapluvon dum pluvemaj tagoj.
Es conveniente usar el paraguas en los días lluviosos.
- Estas konvena la uzo de la parapluvo dum pluvemaj tagoj.
Es conveniente el uso del paraguas en los días lluviosos.

Ni vidas, ke oni uzas adverbon se oni akompanas al verbo: *estas konvene uzi....*; kaj ni uzas adjektivon se oni akompanas al substantivo: *estas konvena la uzo de....*

Ambaŭ, adverbo kaj adjektivo, povas fariĝi verbo, kaj tiam ili jam ne estos plue adjektivo aŭ adverbo, sed simple verba formo. Ekzemple:

- Konvenas uzi la parapluvon dum pluvemaj tagoj
Conviene usar el paraguas en los días lluviosos.
- Konvenas la uzo de parapluvo dum pluvemaj tagoj
Es conveniente el uso de paraguas en los días lluviosos.

Sur la unua frazo la verbo *konvenas* anstataŭas la uzon de *estas konvene uzi*. Kaj sur la dua frazo la sama verbo estas uzata anstataŭ *estas konvena la uzo de....*

Ni vidu plian ekzemplon:

- Estas konsilinde pensi antaŭ ol agi.
- Estas konsilinda la pensado antaŭ la agado.
- Konsilindas pensi antaŭ ol agi.
- Konsilindas la pensado antaŭ la agado.

Poezio



Fátima Jiménez

SONĜO

La falintaj folioj de aŭtuno
kovras tiujn vojojn,
kiuj kondukas en hejmon.
Subitaj nuboj disverŝas sian pluvon
sur la dormantan montaron.

La silentaj noktoj eklumigas etajn stelojn,
pendantajn kandelojn
por atendintoj kaj malesperantoj.

La malproksima horizonto similas
al la kurvo de viaj lipoj dum vanta rideto.
La hirundoj supre ŝajnas al mi
diaj portantoj de kompatato.

Alvenas la frua matenruĝo,
la ĉielo estingas siajn kandelojn tremante.
Ĉio restas sen vi
kaj mi restas sen ĉio.

Neniu frapas je mia pordo dum la unua neĝado.
Frosto detruas ĉiun floron ĉe mia ĝardeno.
Vi restos sen mi
kaj sen ni restos ĉio.

Sur miaj vangoj,
sama vento karesas miajn larmojn,
sed ne plu la viajn.
Viaj vagantaj fingroj
ne plu vojaĝos en mia haŭto.

Dio dormas
kaj ni estas ĝia nura sonĝo.
Ni dormu, do.
Ni sonĝos aliajn realecojn.

La falintaj folioj de aŭtuno
kovras viajn malnovajn piedsignojn
sur tiuj vojoj, kiuj kondukas en hejmon.

Nokto silenta kaj trista,
ne ekbruligu viajn kandelojn,
lasu min mallume,
ĉar mi nudas anime kaj korpe.



ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: andaluciaesperanto@gmail.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2011

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.

aeu
Andaluzia
Esperanto - Unuiĝo

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

BENITO CORDOBÉS HERENCIA

1884 - 1936

Kordova Sindikatisto kaj Esperantisto

En la jaro 1884-a naskiĝis en la kordova vilaĝo Castro del Río, Benito Cordobés Herencia. Dum sia jun-aĝo li ĉeestis en sia vilaĝo la lernejon de la majstro Clodoaldo Gracia, kie li lernis legi kaj skribi. Dank'al ĉi tiu instruisto li ekkonis la verkojn de elstaraj anarkistoj kiel Kropotkin, Bakunin aŭ tiujn de la andaluzo Fermín Salvochea.



En la jaro 1910-a li kreis, kune kun aliaj junuloj en sia vilaĝo, anarko-sindikatisman grupon, celanta diskonigi tiun idearon. Díaz del Moral, la plej elstara esploristo de la sindikatismaj luktoj en la andaluza kamparo, diris pri li, ke li estis la plej influema propagandisto de la sindikatisma movado en Andaluzio komence de la 20-a jarcento, ĉar li trakuris centojn da vilaĝoj por sciigi la kamparaj laboristoj pri iliaj politikaj kaj laboraj rajtoj. Tiel, en la jaro 1913 la vilaĝo Castro del Río estis la plej grava centro de la sindikatisma movado en Kordovo. Ĉe la tiea Laborista Centro okazis prelegoj, konferencoj, diskutoj kaj kursoj al kiuj aliĝis la kamparaj laboristoj de la tuta zono.

Dum tiuj jaroj Benito Cordobés ankaŭ ĉeestis renkontiĝojn en la urbo Kordovo. En la jaro 1916-a li partoprenis en mintingo kie li petis la liberecon por ĉiuj politikaj prizonuloj, la akcepton de la strik-raĵto ankaŭ por la kamparanaj laboristoj kaj la kompletan amnestion por ĉiuj sindikatistoj malliberigitaj. Ĉeestis al tiu renkontiĝo ankaŭ Francisko Azorín Izquierdo, kordova socialisto kaj unu el la plej aktivaj esperantistoj en Kordovo.

Baldaŭ Benito Cordobés transiris el siaj unuaj anarkismaj ideoj en la socialisman idearon. Li aliĝis al UGT, la socialisma sindikato, kvankam li

neniam forgesis sian utopian anarksiman kredon rilate la kulturigon de la laborisma klaso. Li ekde tiam kunlaboris kun la UGT-aj eldonaĵoj, inter ili *Fuerza y Cerebro* kaj *Córdoba Obrera*. Li skribis tiam:

Neniam kiel nun mi ĝuis la plezuron resti izolita. Neniam kiel nun mi disponas pri mia propra libereco. Kelkaj opinias, ke mi jam ne luktas, ke mi forgesis la agadon kaj eĉ, ke mi perdis la kurson de miaj ideoj kaj kredoj. Apudaj personoj ankoraŭ kredas tion! Tamen, kiam mi studas la kritikajn filozofiajn biografiajn, mi trovas tute necese forlasi tiun mondon kie oni kalumnias sed oni ne kritikas. Kiam ĉirkaŭ mi ĉio estas silento, kiam neniu atentis pri miaj mesaĝoj aperas ĉe mi la malfeliĉo kaj tiam mi mem komprenas, ke mi atingis nenion, ke mi valoras neniom, tamen mi devas resti aktiva en ĉi tiu lukto, ĉar mi sopiras lukti, mi amas tion kio estas nova kaj neatendata.



Andaluziaj Ter-Laboristoj komence de la 20-a jarcento

Aperis tiam Benito Cordobés ne nur kiel aktiva sindikatisto, sed ankaŭ kiel persono celanta pligrandigi la kulturan nivelon de la kamparaj laboristoj en Andaluzio. Li memoris tiam sian unuan instruiston Clodoaldo Gracia, aktiva apoganto de la raciismaj lernejoj fonditaj de la kataluna

Ferrer i Guardia. Fondiĝis tiutempe tiaj lernejoj en kordovaj vilaĝoj kiel Bujalance, La Carlota, Fernán Nuñez, Castro del Río, ktp, kaj en aliaj andaluziaj urboj kiel Dos Hermanas, Olvera kaj Setenil.

Benito Cordobés decidis helpi la fondiĝon de raciisma lernejo en la kordova vilaĝo Montemayor, kie li tiam loĝis. Tie li ricevis la apogon kaj ekonomian helpon de aliaj laboristoj kaj ĉi tiel li atingis aĉeti domon ĉe la strato Borruelo en tiu kordova vilaĝo. Sed la instruistaj aŭtoritatuloj tuj ordonis fermi la lernejon, ili konsideris, ke tiaj centroj konkurencis al la jam ekzistantaj oficialaj lernejoj kie oni ne kritikis la ekzistantajn povajn fortojn.

Kiam en la jaro 1931-a oni proklamis la Respublikon en Hispanio, Benito Cordobés rekomencis sian politikan kaj sindikatisman agadon ene de la socialisma sindikato UGT, li ankaŭ estis la prezidanto de maldekstra grupo en la kordova vilaĝo Espejo. Tie li fondis kulturalan centron por laboristoj, la Laborista Socialisma Societo. El tiuj pozicioj li kritikis la kapitalismon, la kacikismon kaj la Katolikan Eklezion. Li denove vojaĝis tra la vilaĝoj de la kordova provinco por defendi kaj propagandi la socialismajn ideojn kaj ankaŭ nun la ĵus fondita Respublikon.

Kiel dirite Benito Cordobés konis al Francisco Azorín Izquierdo okaze de vizito al la urbo Kordovo por partopreni en socialisma mitingo. Li ambaŭ estis membroj de la UGT-sindikato, kaj ĉies konata la intensa propaganda farita de Azorín en Kordovo favore al la internacia lingvo esperanto. Cordobés helpis la organizadon de kursoj de esperanto ĉe la laborista centro de li fondita en Espejo, li eĉ lernis la lingvon kaj favorigis la disvastigon de esperanto. Laŭ li esperanto estus la komunikilo de la laboristoj de malsimilaj ŝtatoj, do parolantaj malsimilajn lingvojn, kiam definitive la lukto inter la proletaro kaj la kapitalistoj okazos, kaj tio sendube okazus iam.



Dum la ekigo de la hispana milito en la monato julio 1936, Benito Cordobés troviĝis en Espejo. Li estus tuj arestita kune kun aliaj personoj. Dum la unuaj tagoj de lia malliberiĝo lia edzino Dolores sukcesis viziti lin. Post kelkaj tagoj ĉiuj arestitoj iris en la malliberejon de la apuda vilaĝo Montilla. En la nokto inter la 6-a kaj la 7-a de aŭgusto 1936-a, kvardek malliberigitoj mortis pafitaj apud la rivereto Carchena, inter ili Benito Cordobés Herencia. Liaj restaĵoj ankoraŭ troviĝas tie, kune kun multaj aliaj malamikoj de la nova hispana reĝimo de la ĝeneralo Franco.

←

Propaganda afiŝo eldonita de la UGT-sindikato dum la hispana civila milito.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de la Asocio.



PLATERO KAJ MI

Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon.

Tradukis en esperanton: Miguel Gutiérrez Adúriz

Prezo: 8 eŭroj.



SANGA NUPTO

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedia sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almería, dum nupta ceremonia.

Tradukis en esperanton: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj.

Pliajn librojn kaj E-materialon aĉeteblan Vi trovos sur la blogo de nia asocio ĉe:

<http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com>

Novelo.-

La ĉefrolulino

Ŝi ne konis la kialon, tamen tiumatene ŝi ne kapablis malfermi siajn okulojn. Do, ŝi restis surlite dum kelkaj pliaj minutoj. Tie, ŝi pensis, ke verŝajne tiu estus la lasta fojo dum kiu ŝi povus ĝui la varmon de tiu olda mantelo, kiu, donacita de sia avino, akompanis al ŝi dum la malvarmaj vintraj noktoj. Ŝi kutimiĝis al la ĉirkaŭantaj objektoj, ŝi certe bezonis nenion pli, do ekde sian infan-aĝo ŝi ne trovis necesa la homan apudecon.

Tamen, ti matene la tago komenciĝis malsimile. La sono de ŝia soleco estis malsimila, temis pri tondro kiu surdigis ŝin. Ŝi bezonis eliri el tiu ĉambro. Rideto aperis ĉe ŝia vizaĝo kiam la unua ekblovo da vento batis ŝin. Ja temis pri freŝa aero plena je vivo.



Tiu aktorino estis belega, sur la ŝrankoj troviĝis kelkaj el tiuj oraj statuetoj kiuj en Hollywood estis konsiderataj kiel necesaj, se oni deziris esti iu grava. La modo dum ŝia jun-aĝo similigis ĉiujn junulinojn, do samaj vestaĵoj, sama hararanĝo, eĉ sama parol-maniero; ĉi tiel ĉiuj aktorinoj estis blondaj kun la hararo ondumita kaj kun vespa talio.

Ŝi, dum la tuta tago, vidis tiujn klasikajn kino-filmojn. Filmoj kie la intrigo estis plena je amo kaj pasio, kie la plej belaj virinoj estis amataj kaj foje savataj de la plej fortaj, kuraĝaj kaj samtempe romantikaj galantuloj.

Eble pro tio, ŝi ne ellitiĝis ĝustatempe tiumatene. Verŝajne ŝi songis, kun la brakoj de belega ĉefrolulo kaj ŝi mem kiel ĉefrolulino. Sed tuj, ŝi vidis, ke la realo estis tute alia. Tamen ŝi tion decidis tiam, li estus la ĉefrolulino.

Ŝi vidis siajn manojn. Ŝi forgesis meti siajn gantojn, sed tio ne estis grava, ŝi jam decidus kiamaniere forviŝi la blondan tinkturon makulanta ŝiajn manojn. Krome, la hararo fariĝis alloge platen-blonda. Ŝi vidis sin mem tiel bela, ŝi estis kiel tiuj aktorinoj. La horloĝo montris la dekan horon matene kaj la unua afero jam estis plenumita.

Kvankam kaŝita ene de antikva kofro la vestaĵo aspektis bone konservita. La tempo-paso ne estis videbla inter la kudraĵoj, malgraŭ la fakto, ke la unua fojo kiam tiu vestaĵo kovris virinon estis antaŭ multegaj jaroj, ŝia avino estis dek okjaraĝa. Tamen, ĝi estis perfekta, la ŝtofo estis blua, milda kaj delikata. Sendube la tajloro kreis ĝin por utili kiel la dua haŭto de la plej bela virino.

Ŝi eliris surstraten, la hela lumo blindigis ŝin dummomente. Ŝiaj pupiloj ne kutimiĝis rapide al tiu heleco... sendube tiom da jaroj ene de tiu ĉambro, antaŭ la televido kaj tiuj klasikaj blank-nigraj filmoj, deformigis ĉiujn bildojn aperantaj antaŭ ŝi. Por ŝi ne estis facile vidi kio estis proksima aŭ malproksima. Ŝi ŝajnis esti perdita, misorientita.

Ĉio okazis rapide. Ŝi apenaŭ sentis doloron. La frapo lanĉis al ŝi je kelkaj metroj. Ŝi ne vidis la aŭtomobilon alproksimiĝi, ankaŭ ne ŝi kapablis aŭdi la voĉojn kiuj avertis ŝin pri la rapida alveno de tiu veturilo. La ŝoforo ne povis eviti la kolizion.

Ŝi mortis feliĉa. La blua vestaĵo beligis ŝian figuron, la platen-blonda hararo plibeligis ŝian naturan belecon. Finfine ŝi estis la plej grava ĉefrolulino kaj ĉiuj spektantoj surstrate atente rigardis ŝin.



PILAR SARASOLA

Virino kontraŭfluen

La pasintan 23-an de novembro prezentiĝis ĉe la Andaluzia Fimoteko en Kordovo la kurtfilmo “Pilar Sarasola, virino kontraŭfluen”. Temas pri omaĝa filmo celanta memori al Pilar Sarasola, vivdino de la kordova libro-vendisto Rogelio Luque.



La filmon realigis Juan Martínez, kun skripto de Matilde Cabello, kaj ĝi temas pri la vivo de Pilar Sarasola, pere de familiaj fotografiaĵoj, dokumentoj kaj atestoj. La rezulto estas grafika dokumento parolanta pri virino plena je kuraĝo kaj ĝi samtempe estas vojaĝo tra la urbo Kordovo dum la komenco de la pasinta jarcento, temanta ankaŭ pri la kultura vivo de la urbo dum tiuj jaroj. En la kurtfilmo aperis ne-konata materialo, ĉefe fotografiaĵoj, libroj, revuoj, katalogoj, ktp. Ĉiu ĉi materialo estis prutendonita de la familio Luque Sarasola mem kaj de aliaj personoj kaj organizoj. Ankaŭ aperas atestoj de personoj kiuj pro familiaj aŭ amikemaj rilatoj konis al Pilar Sarasola, inter ili konataj verkistoj kiel Pablo García Baena, Ginés Liébana kaj Gerardo Olivares. Ankaŭ aperis en la filmo Antonio Luque, filo de Pilar Sarasola kaj ŝia nepo Rogelio, kiuj elstarigis la homan valoron de ĉi tiu kuraĝa virino.

Pilar Sarasola naskiĝis en la astura urbo Gijón en la jaro 1905-a. Dum tiuj jaroj ne estis normala afero ke virino sekvis superajn studojn, tamen

ŝi studis ĉe la Komerc-Lernejo de sia urbo. Dank'al la korespondado ŝi konis la kordovan libro-vendiston Rogelio Luque, kaj kiam ŝi estis 18-jaraĝa, Rogelio iris en Gijón por geedziĝi. Ili tuj revenis en Kordovon kie Rogelio estis la proprietulo de unu el la plej gravaj libro-vendejoj en la urbo. Pilar ne estis nur la edzino de Rogelio Luque, ŝi ankaŭ estis lia kunulo en la libro-vendejo kaj ŝi partoprenis en la kultura vivo de la urbo.

En la jaro 1936-a kiam komenciĝis la civila milito en Hispanio, la ribelintoj arestis en Kordovo al Rogelio Luque kaj, sub la akuzo ke li vendis marksismajn librojn kaj ke li estis favora al progresemaj ideoj, ili mortpafis ilin. Post la milito Pilar Sarasola ne revenis en sian naskiĝ-urbon, male ŝi daŭrigis la negocon ekigita de sia edzo kaj tut-fiere ŝi ŝanĝis la nomon de la libro-vendejo, kiu ekde tiam nomiĝis *Librería Viuda de Luque* (Libro-vendejo de la Vivdino de Luque). Post la milito kaj ĝis la reveno de la demokratia politika sistemo en Hispanio la libro-vendejo estis la plej grava kulturejo en la urbo. Ŝiaj filoj Rogelio kaj Antonio helpis ŝin en la libro-vendejo kaj en la jaro 1981 Pilar Sarasola forpasis.

Antaŭ kelkaj monatoj Alejandrina Urquizar, bonepino de Pilar Sarasola, kontaktis kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉar ŝi trovis en interreto artikolo aperinta sur *Gazeto Andaluzia*, kie oni menciis la esperantistecon de Rogelio Luque. Ŝia celo estis aperigi kelkan grafikan dokumenton kiun nia asocio povus disponi pri Rogelio Luque okaze de kelka esperanto-renkontiĝo. Rogelio Luque estis aktiva esperantisto dum la unuaj jardekoj de la pasinta jarcento en Hispanio. Li estis delegito de Universala Esperanto-Asocio en nia urbo kaj ĉe lia libro-vendejo troviĝis la esperanto-informejo de la urbo.

La Historia Arĥivo de nia asocio serĉis tiajn dokumentojn kaj oni havigis al la familio kopiojn de fotografaĵojn de Rogelio Luque okaze de la 3-a Iberia Kongreso de Esperanto, okazinta en Kordovo en la jaro 1925, hazarde ni poste sciis, ke en tiu sama fotografaĵo kie aperas kelkaj gepartoprenantoj en la Kongreso estas videbla ankaŭ Pilar Sarasola. Ni ankaŭ metis je la dispono de la direktoro de la kurtfilmo aliajn dokumentojn kiel reklam-foliojn de la libro-vendejo eldonitaj en nia lingvo.

Kiel dirite la prezento de la kurtfilmo okazis la pasintan 23-an de novembro. La familio invitis al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉeesti la premieron de la filmo, kio okazis ĉe la Andaluzia Filмотeko en Kordovo. Nome de nia asocio ĉeestis Angel Arquillos, Prezidanto de nia asocio, Mariló Torres, Kasistino kaj José María Rodríguez, Voĉdonanto de propagando kaj

respondeculo de la Arĥivo de AEU. Tie, ni havis la eblon koni la familianojn de Rogelio Luque kaj Pilar Sarasola, inter ili Antonio Luque Sarasola kiu tre emocie diris al ni, ke sia patro ĉeestis en Francio Esperanto-Kongreson kaj ke, kvankam la tuta familio sciis ke Rogelio Luque estis esperantisto ili ne konis la agadojn plenumitajn en nia movado de Rogelio Luque.

Fine de la kurtfilmo, kiam aperis sur la ekrano la nomoj de kunlaborantoj kaj kunhelfantoj en la projekto, estis videbla, inter multaj aliaj, la nomo de José María Rodríguez, kiel respondeculo de la informoj aperantaj en la filmo rilate la esperanto-movadon. Kurioze, la lasta bildo aperanta sur la filmo, kiam oni dankis al asocioj kunlaborantaj, estas la nomo de nia asocio *Asociación Andaluza de Esperanto*.

Ja, estis orgojlo por ni vidi la nomon de nia asocio sur granda ekrano de kinejo. Temis pri bonega laboro kiu celas ne nur propagandi nian lingvon kaj movadon, sed ankaŭ diskonigi la vivon de personoj kiuj laboris en la disvastigado de nia lingvo en nia lando antaŭ multaj jaroj. Mi memoru ĉi tiujn pionirojn.



Okaze de la 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, nia asocio eldonis du turismajn broŝurojn pri Jaeno. Venontnumere ni pliigos informojn pri ambaŭ kaj ni informos pri la projekto de AEU eldoni novajn turismajn broŝurojn en esperanto.

Internaciaj Esperanto-Asocioj

Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj ILERA

En la jaro 1925-a fondiĝis en Parizo la Internacia Radio-Asocio. Temis pri grupo kie renkontiĝis aro da esperantistoj kiuj estis ankaŭ radio-amatoroj. Ili publikigis la revuon *Internacia Radio Revuo*, kie aperis la unuaj esperantlingvaj teknikaj vortaroj pri radio. Tamen, post kelkaj jaroj la agado ĉesis. En 1946-a ekfunkciis en Brazilo nacia esperantista asocio kun la nomo *Círculo dos Radioamadores Esperantistas*. Post ĉi tiu asocio kaj jam dum la 5-a jardeko de la pasinta jarcento, esperantistoj parolis pri la organizado de nova tutmonda radioamatora esperantista asocio.



En la jaro 1960-a fondiĝis la klubo JA1YAR, kie aktivis kelkdeko da esperantistoj kiuj eldonis samtempe la revuo *EKARO*. Aperis tiam la unua radorondo uzanta la internacian lingvon dum tagoj kaj horoj difinitaj sed nur por la pacifioceana zono. Aliaj grupoj aperis sur aliaj partoj de la mondo kaj eĉ oni eldonis diversajn revuojn pri radioamatora temaro, kiel *Esperanto-Radio* kaj *Esperantista Radioamatora Bulteno*.

Dum la 55-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno (Aŭstrio), jaro 1970-a, Rudi Bartosh lanĉis la ideon fondi la *Internacian Ligon de Esperantistaj Radio-Amatoroj* (ILERA). Dek kvar radioamatoroj el sep landoj unuanime apogis la projekton.

La celoj de ILERA estas praktiki esperanton per la radio-ondoj kaj konigi nian lingvon inter ĉiuj radioamatoroj. La membroj de ILERA nun estas 270 kaj oni eldonas, antaŭtempe sur papero kaj nuntempe pere de interreto, la revuon *ILERA-Bulteno*, aperanta 4-foje en la jaro. ILERA ankaŭ organizas kongresan radio-stacion dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiu estas bona propagandilo por nia lingvo. Dum la tagoj de la Kongreso estas faritaj

multaj kontaktoj kaj oni informas al ĉiuj pri la lingvo kaj pri la Kongreso. La kongresa stacio, kvankam provizora, ricevas propran identigilon, ekzemple tiu funkcianta dum la Universala Kongreso en Valencio en la jaro 1993-a ricevis la vok-signon ED5SPE.



Wolf Krueger ĉe la Kongresa Radio-Stacio TM8E
Universala Kongreso de Esperanto – Montpelliero
1998

Ekde la jaro 1977-a ILERA organizas *Esperanto Konkurson*, okazanta ĉiujare dum la tria semajnfino de novembro, pere de kiu oni premias al la radioamatoroj atingantaj pli da kontaktoj pere de esperanto. Same, oni liveras diplomon al tiuj radioamatoroj kapablaj prezenti minimume 10 kontakt-konfirmkartojn preŝitaj en esperanto aŭ kun esperanto-teksto. Kvankam ekzistas ILERA-anoj, kiel tiu kun voksigno DL1CC, kiu jam atingis pli ol 200 konfirm-kartojn.

Regulaj rondoj en la etero ekzistas kun jena horaro kaj zonoj:

Eŭropo: dimanĉe, lunde je la 12:30 horo sur la frekvenco 14,266 MHz..

Sud-Ameriko: sabate, dimanĉe je la 20:30 horo sur la frekvenco 14,266 MHz.

Pacifika Oceano: sabate je la 22:00, 22:30 kaj 24 horo sur la frekvenco 21,266 MHz.

Se al Vi interesas atingi aŭ ricevi pliajn informojn pri esperanto kaj radioamatoroj, bv. viziti jenan TTT-adreson:

www.esperanto.org/internacia/ILERA

NOVA ELDONA PROJEKTO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Dum la pasinta 15-a Andaluzia Kongreso de Esperanto nia sevila samideano José Roldán León sciigis al ni ĉiuj, ke li plenumis tradukon de la libro de la sevila ĵurnalista Antonio García Barbeito “*La Tago kiam Jesuo ne volis naskiĝi kaj aliaj Kristnaskaj rakontoj*”.



La sevila ĵurnalista Antonio García Barbeito

Ĉi tiuj rakontoj, unue pripensitaj kiel radio-dialogoj, ariĝis en libro jam eldonita en la hispana lingvo kaj ĝi estis la bazo de la malferma parolado de la Kristnaskaj Festoj de Sevilo de la jaro 2010, prononcita de la aŭtoro mem. *La Tago kiam Jesuo ne volis naskiĝi* estas preskaŭ teatra verkaĵo, ĝi eĉ estis jam

reprezentata ĉe kelkaj sevilaj paroĥejoj. Anĝelo trovas betlehemajn figuretojn kaj ĝi anoncas al ĉiuj ili, ke Jesuo ne deziras naskiĝi pro la fakto ke la mondo estas plena je malamo, envio kaj avareco. Tamen la Anĝelo vidas, ke ne ekzistos paco, ĝajeco kaj eĉ libereco se finfine Jesuo ne naskiĝas. Do, kvankam Jesuo trovis sufiĉajn kialojn por ne naskiĝi, fine li naskiĝas en Betlehemo. La teksto estas simple belega.

La tradukanto estas José Roldán León, sevila esperantisto kiu krome estas amiko de la aŭtoro. Pro tio ni planis eldoni la tradukon ĉar la propra aŭtoro rajtigis al ni fari tion. Espereble la libro estos jam eldonita dum la unuaj monatoj de la jaro 2011-a.

KRUCVORTENIGMO

	A	B	C	Ĉ	D	E
1						
2				■		
3						
4		■			■	
5						
6						
7				■		
8						

1. Nombro. 2. (Adjektive) Metalo rigardata kiel multvalora. ■ Inverse, finaĵo de la adjektivo en akuzativa formo. 3. (Plurale kaj inverse) Anatomia apartigaĵo inter du kavoj aŭ inter du partoj de unu organo. 4. Adverba finaĵo ■ Inverse, finaĵo de la adjektivo en akuzativa formo. ■ Konsonanto. 5. Meto de vegetaĵo en teron por ke ĝi plue kresku. 6. (Inverse kaj sen la lasta vokalo) Alvoko al la publiko per ĉiuspecaj rimedoj por laŭdi kaj rekomendi komercaĵojn, entreprenon aŭ ian aferon. 7. (Inverse) Patro de patro. ■ (Inverse) Nombro. 8. (Plurale) Impona graviga aspekto de lukse ornamita vidaĵo.

A. (Inverse kaj akuzative) En la antikva Italio, urbo detruita en 79 a.K. de vulkana erupcio. B. Kolekto da samspecaj objektoj. ■ Purigo per akvo aŭ alia likvaĵo. C. (Inverse) Post. Ĉ. Konsonanto. ■ (Inverse) Mezepoka paĝio kiu servis la nobelon por fariĝi kavaliro. ■ Konsonanto. D. Interne. ■ Subbrake portata ujo por oportune transporti librojn. E. (Plurale) Mamulo kun plata vosto vivanta ĉe riveroj.

SOLVO DE LA PASINTNUMERA KRUCVORTENIGMO

D	E	F	I	O	J
A	P	A	R	T	A
■	O	R	A	R	E
■	N	■	N	A	N
K	I	S	O	■	A
O	V	O	■	I	N
A	K	L	A	M	O
L	■	V	I	A	J

Humoro



ESPERANT-LINGVA KURTFILMO EN ANTEKERO

Dum la pasinta monato novembro okazis en la malaga urbo Antekero, la 13-a Nacia Konkurso de Kurtfilmoj “*Ciudad de Antequera*”. Prezentiĝis pli ol 400 filmetoj kaj inter ili unu filmita tute en esperanto, kaj subtitolita en la hispana lingvo. Temas pri la kurtfilmo “*Cent*”, kies aŭtorino estas Marie QUILLY. Marie estas francino, ŝi diplomiĝis pri grafika fasonado kaj post tio ŝi komencis studi aŭdovidan fakon. En la Universitato de Granado ŝi licenciĝis pri Aŭdovida Komunikado kaj nuntempe ŝi studas Magistron pri Kino en Kordovo. Ŝi eklernis esperanton en Francio sed ŝi interesiĝis pli pri nia lingvo kiam ŝi ekkonis en la Universitato de Granado al nia samideanino Fátima Jiménez. Marie estas la aŭtorino de kelkaj kurtfilmoj en la franca, la hispana kaj nun ankaŭ en esperanto.

La kurtfilmon *Cent* jam ni povis spekti dum la 14-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Malago (2009). Ĝi ne estas varbilo por la E-movado sed ŝercema rakonto pere de esperanto. La filmo daŭras apenau 4 minutojn kaj en ĝi rolas 3 geaktoroj, Marie Quilly mem, nia arunda samideanino Fátima Jiménez kaj Eloy Ramos. La kurtfilmo estas ege simpatia kaj iomete spica. Oni povas vidi ĉe *youtube*:

<http://www.youtube.com/watch?v=vCOIQM02JQQ>



Marie QUILLY en la kurtfilmo *Cent*

Tuj post vidi la kurtfilmon kelkaj membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo pripensis la eblon proponi al Marie QUILLY kaj al Fátima JIMÉNEZ la kunlaboradon de nia asocio en la produktado de pliaj filmetoj. La realigado de pliaj filmaj projektoj estas interesa ideo celanta apliki nian lingvon ĉiuloke. Krome, tiuj filmetoj povus ankaŭ esti disendataj al esperanto-asocioj de la tuta mondo. Pro tio AEU jam proponis ĉi tiun kunlaboradon al Marie QUILLY kaj al Fátima JIMÉNEZ, ni eĉ oferis al ili duon-profesia kameraon kiu povus esti tre utila en ilia laborado. Ili ambaŭ akceptis tuj nian proponon.

Do, jen la vico diskogini ĉi tiun projekton al la ceteraj andaluziaj gesamideanoj, al kiuj povus interesi ĉi tiu projekto. Ni proponas du aferojn:

1) Ni dezirus ricevi skriptojn aŭ ideojn por ellabori kurtfilmojn. Ekzemple, kompletaj skriptoj, scenaroj, dialogoj, roluloj, ktp. Do, kiu ajn rakontebla historio kiu povus esti post kurtfilmo.

2) Dualoke, ĉu vi ŝatus roli ĉe tiuj filmoj? Ĉu vi ŝatus aperi kiel aktoro ene de unu el tiuj filmetoj? Ĉu vi kapablas? Ĉu vi kuraĝas?

Se jes, kontaktu kun unu el la elektronikaj adresoj de AEU, ekzemple pere de esperanto14@ono.com Ni atendas Vian proponojn kaj kompreneble Vian sinoferon.

Es ahora el momento de dar a conocer el proyecto de realización de cortos en esperanto al resto de esperantistas andaluces a quienes pudiera interesar la idea. Te proponemos dos cuestiones:

1) *Nos gustaría recibir guiones o ideas para elaborar estos cortos. Por ejemplo: guiones completos, escenarios, diálogos, personajes, etc. Esto es, cualquier historia que pudiera contarse y que luego pudiera ser el argumento de un corto.*


2) *En segundo lugar, te hacemos esta pregunta ¿Te gustaría actuar en uno de esos cortos? ¿Te gustaría aparecer como actor? ¿Eres capaz? ¿Te atreverías?*

Si crees que puedes aportar alguna buena idea o incluso participar en el proyecto contacta con alguna de las direcciones de correo electrónico de la Asociación Andaluza de Esperanto, por ejemplo a través de: esperanto14@ono.com Quedamos a la espera de tus propuestas y por supuesto de tu ofrecimiento.

Turismi en ... EL PUERTO DE SANTA MARÍA

Konata kiel la urbo de la cent palacoj El Puerto de Santa Maria en la kadiza provinco estas unu el la plej belaj turismaj zonoj en la kadiza golfeto. La legendo rakontas, ke post la troja milito la atena militestro Menestheo vagadis tra la Mediteranea Maro ĝis kiam li atingis la enfluejon de la rivero Guadaleta, tie li fondis malgrandan urbon kies nomo estus “Haveno de Menestheo”. Verŝajne temas nur pri legendo kiu volas klarigi kaj honorigi la originon de la nuntempa urbo El Puerto de Santa Maria, sed ja estas tute certe, ke fenicoj kaj grekoj alvenis jam dum la 9-a jarcento a.K. en ĉi tiun saman lokon.

Romianoj kaj Visigotoj venis ankaŭ en la urbon kaj en la jaro 711 la araboj eniris en El Puerto de Santa Maria, kiu ricevis la nomon *Alcanatif*, kies signifo estas “haveno de la salejoj”. La reĝo Alfonso la 10-a konkeris la urbon en la jaro 1260 kaj li havigis al ĝi la nomon “Santa Maria del Puerto”.



Blazono de El Puerto de Santa María

En la 14-a jarcento la kastilia reĝo donas la urbon al la Duko de Medinaceli, naskiĝas tiam la plej oraj momentoj de El Puerto de Santa Maria. Kristoforo Kolombo loĝis en la urbo antaŭ la eltrovo de la nova kontinento kaj eĉ la ŝipon Santa Maria oni konstruis en la haveno de la urbo. La eltrovo de Ameriko havigis grandan ekonomian prosperon al la urbo, oni konstruis palacojn kaj la plej gravaj komercistoj malfermis komercejojn tie. Juan de la Cosa ellaboris la unuan mapon inkludanta la novan kontinenton en El Puerto de Santa Maria kaj dum la jarcentoj 16-a kaj 17-a sidejis tie la stabejo de la kastilia mar-armeo. Dum la 17-a jarcento en la urbo loĝis nombraj kleruloj kiuj bonvenigis la napoleonan invadon de Hispanio, dum la milito 1808-1812 El Puerto

de Santa Maria estis grava sidejo de la franca armeo. Poste la reĝo Ferdinando la 7-a abolis ĝuste en El Puerto de Santa Maria la liberalan konstitucion aprobata en Kadizo en la jaro 1812.

Dum la 19-a jarcento pro la sendependiĝo de la amerikaj kolonioj la komerco kun tiu kontinento malpliĝis, do ankaŭ la ekonomia vivo de la urbo. Tamen la alveno de eksterlandaj vin-komercistoj, ĉefe britaj, kiel la familioj Osborne, Terry kaj Domecq, impulsis la vivon de la urbo dank'al la apero de entreprenoj kiuj produktis kaj eksportis la vinon. Dum la 20-a jarcento El Puerto de Santa Maria ankaŭ vivis ekonomian impulson dank'al la turismo. Konstruiĝis en la urbo multaj hoteloj kaj turismajn lokojn por alvenigi hispanajn kaj eksterlandajn turistojn kaj novaj zonoj de la urbo, kiel Valdelagrana kaj Fuenterrabía fariĝis internacie konataj.

Monumentoj.

Kastelo San Marcos

Temas pri la plej konata monumento en la urbo. Starigita dum la 10-a jarcento unuamomente ĝi utilis kiel gvato-turo kaj poste ĝis la 13-a jarcento ĝi estis moskeo. Post la konkero de la urbo fare de la kastilia reĝo oni donacis ĝin al religia ordeno kiu establis tie monaĥejon. Dum la 14-a jarcento oni rekonstruis ĝin por utili kiel fortreso. Nuntempe ĝi estas kulturejo de la Urbodomo.



Palaco Medinaceli

Ĝi estis la loĝejo de la unua grafo de El Puerto de Santa María, la duko de Medinaceli. Ĝi estas konata kiel la loko kie loĝis Kristoforo Kolombo antaŭ ol eltrovi Amerikon. Nuntempe ĝi utilis kiel luksa hotelo de la urbo.

Priora Preĝejo

Starigita dum la 15-a jarcento sur la plej alta pinto de la urbo. Sur ĝi aperas gotikaj elementoj, kiel la Pordego de la Pardono kaj ankaŭ barokajn kiel la Pordego de la Suno. Ĝi ankoraŭ estas la plej grava katolika preĝejo en la urbo.

Muzeo – Fondaĵo Rafael Alberti.

Temas pri muzeo dediĉita al ĉi tiu konata poeto naskiĝinta en El Puerto de Santa María. Ĝi posedas pli ol 5.000 libroj kaj temas pri nepre vizitenda loko se oni deziras studi la verkaron de Rafael Alberti.

Vin-Keloj

Kiel dirite dum la 19-a jarcento El Puerto de Santa Maria fariĝis internacia centro rilate la produktadon kaj komercadon de vino kaj brando. Do, stariĝis dekoj da vin-keloj kie oni ellaboris la vinon. Ankoraŭ restas kelkaj en la urbo kaj ili estas konsiderataj “katedraloj de la vino kie ripozas miloj da kverkaj bareloj”. Kelkaj el tiuj vin-keloj estas viziteblaj, ekzemple la “Vin-keloj Terry” aŭ tiuj de González Obregón.



Gastronomio

En la gastronomio de El Puerto de Santa Maria estas necese elstari la mar-fruktojn aŭ mariskojn. Eĉ ekzistas avenuo tuj apud la haveno de la urbo konata kiel la “river-bordo de la mariskoj”, tie abundas la restoracioj kie oni povas gustumi ĉiajn mar-fruktojn kaj la plej bongustan friktitajn fiŝojn. La plej konataj mariskoj estas la salikokoj pere de kiu oni povas prepari ĉiuspecajn manĝaĵojn, tiel salikok-omleto kaj koktelo al kiu oni adicias salon, vinagron, cepon, verdan kapsikon kaj tomaton, temas pri manĝaĵo konata kiel *pirriñaca*.

Tipa gazpaĉo estas la konata “varma ajlo”, ellaborita kun bruna pano, ajlo, salo, kapsiko kaj oliv-oleo. Kiel deserto estas konsilinda la “poleá”, ellaborita kun friktita pano kaj sukero, al kiu oni povas aldoni mielon.

Festoj

Kiel preskaŭ ĉiuj apud-kadizaj urboj El Puerto de Santa Maria organizas allogajn karnavalajn festojn en la monato februaro. Ili estas tute similaj al tiuj de Kadizo, do maskul-bandoj prikantas la plej aktualajn aferojn ene de diboĉa etoso. Ĉe la Municipa Teatro Pedro Muñoz Seca, okazas konkurso de tiuj maskul-bandoj. Dum la printempo, ĝenerale kvin aŭ ses semajnoj post la Pasko, okazas la Printempaj Festoj ankaŭ konataj kiel la Festoj de la Vino, temas pri tipe andaluza foiro. La 16-an de julio Festo-Tago de La Virgulino de Karmen, patronino de la maristoj, oni organizas religian paradon tra la stratoj pli apudaj al la rivera haveno.



Pere de la tipa *vaporcito* (vapor-ŝipeto) estas eble vojaĝi de El Puerto de Santa María en Kadizon.

Venont-numere Turismi en

ALOSNO (Onubo)

ANDALUZA KUIRARTO

Ruĝa ajlo laŭ la almeria stilo

La ruĝa ajlo estas tipe somera manĝaĵo de Almerio. Jen la necesaj ingredientoj:

- 1 kg. da terpomoj.
- 2 sekaj kapsikoj.
- 2 ajleroj.
- Salo
- 2 cepoj
- ½ kulereto da kumino
- Kulerego da oliv-oleo

Jen la preparado:

- 1) Oni subakvigas la sekajn kapsikojn en mezvarman akvon dum duonhoru, cele moldigi lin. Post tiu tempo oni raspas la pulpon pere de tranĉilo. Kun la rezulto de tiu raspado oni formas paston.
- 2) Ŝenseligu la terpomojn. Tranĉu ilin laŭ grandaj kvadratoj.
- 3) Ŝenseligu same la ajlerojn kaj la cepojn laŭ 4 pecoj.
- 4) Ene de granda kuirpoto oni bolas ter-pomojn, la cepojn kaj la ajlerojn. Oni aldonas salon.
- 5) Pere de miksilo oni batas la paston de la kapsikoj, la cepon, la terpomojn kaj la ajlerojn, ĝis atingi fajnan pureon. Oni aldonas la kuminon.
- 6) Oni aldonas al tiu tutaĵo la akvon uzita okaze de la bolado de la terpomoj, kvankam ne la tuta akvo.
- 7) Aldonu oliv-oleon ne ĉesante movi.
- 8) Servu kaj gustumu malvarme.

Manĝaĵoj kaj ilaro aperanta en ĉi tiu recepto



Kapsikoj



Tranĉilo



Ter-pomoj



Ajlo kaj ajleroj



Cepo



Kuir-poto



Salo



Miksilo



Kumino



Oliv-oleo



Ĉu Vi ŝatas nian revuon?

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jam eldonis preskaŭ naudeko da numeroj de *Gazeto Andaluzia*.

Ekde ĉi tiu numero la redakcio de la revuo pliigas la nombron da paĝoj, kiuj ekde nun estas 44 kaj nia revuo aperas akurate 4-foje en la jaro. Tamen, ĉi tio eblas nur se ni atingas vekti la intereson de nia legantaro. Nia celo estas diskonigi la internacian lingvon en Andaluzio kaj samtempe disvastigi la andaluzian kulturon en la tuta mondo pere de esperanto.

Do, se Vi konsideras nian revuon kiel partopreninda projekto kaj al Vi plaĉas niaj celoj ni invitas Vin kunlabori kun ni. Se Vi estas preta sendi al ni Viajn kunlaboraĵojn bv, kontakti kun ni:

Redakcio de *Gazeto Andaluzia* esperanto14@ono.com
 Apartado de Correos 3142 E-14080 Córdoba

FLAMENKO

La flamenka arto jam estas ne-materia havaĵo de la Homaro, post la decido aprobita la pasintan 16-an de novembro en Najorbio (Kenio) de speciala komitato de Unesko al kiu apartenas 24 ŝtato-membroj. La proponon prezentis la hispanaj ministerioj pri Kulturo kaj pri Eksterlandaj Aferoj kaj Kunlaborado, apogitaj de la Registaroj de Andaluzio, Ekstremaduro kaj Murcio.



Kampanjo lanĉita de la Andaluzia Registaro favore al la deklaro de la Flamenko kiel ne-materia havaĵo de la Homaro

La konsilanto pri Kulturo de la Andaluzia Registaro S-ro Paulino Plata deklaris, ke la flamenko estas arto sufiĉe bone konata en la tuta mondo kaj, eĉ en Japanio, Koreio aŭ Sudameriko troviĝas personoj amantaj ĉi tiun universalan arton. Do, ĉiuj reprezentantoj de la speciala komitato de Unesko voĉdonis favore al la propono prezentita.

Jam en la jaro 2005-a oni prezentis ĉe Unesko saman proponon, tamen tiufoje ĝi ne sukcesis. En la jaro 2009-a oni pripensis relanĉi la ideon, tiel la Hispana Registaro, kune kun tiuj de Andaluzio, Ekstremaduro kaj Murcio ekigis la projekton *Mi estas Flamenko* al kiu aniĝis pli ol 30.000 personoj en 60 landoj. Dank'al tiu internacia apogo finfine Unesko akceptis la proponon deklari la flamenkan arton kiel ne-materia havaĵo de la Homaro. Dum la sama akto oni ankaŭ deklaris tion al la katalunaj *castells*, la majorka *kanto de la Sibila* kaj la mediteranea dieto.

Sed, por kio utilas ĉi tiu deklaro? La deklaro de Unesko konsideri la flamenkon kiel ne-materia havaĵo de la Homaro vekis nombrajn kaj diversajn opiniojn, sed ĝenerale oni admisias, ke temas pri bonega afero ĉar oni parolos pri la flamenka arto en la tuta mondo kaj ĉefe ekster la tradiciaj flamenkaj etosoj, kelkfoje tro fermitaj. Diskutoj kaj debatoj estas ĉiam interesaj, kvankam kelkaj flamenkaj puristoj opinias, ke ĉi ĉio nur estas politikigo de la flamenka arto.

Lastatempe ene de la flamenka arto eble ekzistas du grupoj da artistoj, unu tiuj kiuj estas proksimaj al registaraj kaj politikaj instancoj kaj eĉ vivas dank'al publikaj helpoj kaj al festivaloj organizataj de tiuj. La alia grupo oni konsideras sin tute sendependaj. Kaj jen la problemoj? Ĉu la oficialaj stipendioj povas influi en la flamenka arto? La flamenko, kiel ĉiuj aliaj kulturaĵoj rajtas estis subvenciata. Ni pripensu ekzemple, la produktadon de filmoj, la eldonadon de libroj, la organizadon de ekspozicioj. Estas tute normale akcepti la ideon ke la oficialaj instancoj apogas ĉi ĉiajn kulturajn agadojn, kaj tio ne povas esti komprenata kiel regado aŭ manipulado de la artistoj fare de konkreta registaro.

Do, ĉi tiu oficiala apogo ricevita de la flamenka arto, perfekte povas esti komprenata laŭ la aserto de Fosforito, konata flamenka kantisto, kiu antaŭ kelkaj semajnoj diris, rilate la oficialan deklaron, ke la flamenka arto ne bezonis ĉi tiun nomumon sed ja la flamenko meritis ĝin.

En la jaro 2011-a la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos en Granado.

La dato ankoraŭ estas decidota, do, se Vi estas preta partopreni bv. informi al ni pri la plej konvenaj tagoj por Vi. Same, se Vi opinias, ke estus interese okazigi konkretan programon jen Via ŝanco proponi ĝin. Ni konstruu inter ĉiuj partoprenindan kongreson.

andaluciaesperanto@gmail.com

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Fakultato pri Belartoj en Sevilo

Ĝuste ĉe la centra kvartalo de la urbo Sevilo troviĝas la Fakultato pri Belartoj. Ĝi stariĝas inter la preĝejo *La Anunciación*, kie ankaŭ troviĝas la Panteono de la Sevilaj Elstaruloj, kaj la Palaco de la Markizo de *La Motilla*. Antaŭ kelkaj jaroj aperis la informo, ke strangaj eventoj okazis ĉe la subteraj etaĝoj de tiu konstruaĵo. Kiel dirite, la tombejoj de sevilaj elstaruloj, kiel la poeto Gustavo Adolfo Bécquer aŭ la verkistino Cecilia Bohl de Faber, troviĝas tuj apude. Tamen, la plej teruraj eventoj okazis ĉe la ĉambro de laboristo forpasinta antaŭ kelkaj monatoj.



Korto de la Fakultato pri Belartoj
en Sevilo

Ĉio komenciĝis kiam la fakultataj laboristoj dum la nokta deĵoro, tio estas la purigistoj, la gardisto kaj la pordisto, ekaŭdis sonojn kaj paŝojn ĉe la ĉambro antaŭe okupita de Santiago, purigisto de la Fakultato forpasinta naŭ monatojn antaŭe. Post tiuj unuaj eventoj strantaj okazintaĵoj daŭriĝis: ridoj kaj krioj ĉe la necesejoj, ŝrankoj malfermitaj bruege, elektran man-sekigiloj funkciantaj eĉ sen elektro-fluo.... Tial, neniu laboristo deziris deĵori dumnokte ĉe tiu loko.

En la jaro 2007 la Sevila Universitato permesis parapsikologian esploradon ĉe la Fakultato cele trovi la kialon de tiuj strangaj okazintaĵoj. Verŝajne, estis la unua fojo kiam universitata institucio aceptis ĉi tian ne-pure akademian esploradon. La parapsikologoj uzis ĉiuspecan ilaron (elektronikilojn, komputilojn, vide-aparatoj, son-bendigilojn, ktp). Ĝi komencis la 4-an de junio 2007 je la 15:30 horo. Pro la fakto, ke la eventoj okazis ĉe du konkretaj lokoj, tuj apud la tombejoj de la sevilaj elstaruloj kaj ĉe la ĉambro kie laboris la forpasinta laboristo, same du teamoj lokigis ĉe tiuj

lokoj. Kompreneble la tutan ceteran konstruaĵon oni atente observis pere de elektronikaj detektiloj. Je la 23:15 horo io okazis. Subite, la temperaturo de la dua kaj la tria etaĝo abrupte defalis 9°. Tio estis nekredebla, pro la fakto, ke oni fermis ĉiujn pordojn kaj fenestrojn.

La detektiloj tuj komencis indiki, ke io moviĝis ĉe la koridoroj de tiuj etaĝoj. Je la 0:15 horo la esploristoj sukcesis vidi ĉe koridoro de la 4-a etaĝo blankan formon, la son-bendigoj ekkaptis strangajn sonojn similaj al infanaj kaj virinaj krioj, preĝoj kaj jena frazo: *Foriru!* Pliaj esploristoj vidis tiun estaĵon, temis pri homa korpo, blank-kolora, sen-vizaĝa kaj kiam ĝi eniris en ĉambrom ĝenerale la lampoj lumiĝis. La afero ne solviĝis, la esploro nur utilis por atesti, ke io stranga okazis ĉe tiu Fakultato. La son-inĝenieroj sukcesis kapti la sonojn kaj dum kelke da tempo ili aperis ĉe parapsikologiaj radio- kaj televid-programoj.

La Fakultatoj pri Belartoj ankoraŭ utilas kiel instruejo por estontaj artistoj, pentristoj, desegnistoj, skulptistoj... La strangaj aferoj ankoraŭ ne solviĝis, eble pro tio ankoraŭ neniu laboristo volas deĵori dum la noktaj horoj ĉe tiu universitata centro.

Notu la TTT-adreson de la blogo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo



<http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Seviljo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Sekretario: Julio Herrero Segura

Kasistino: María Dolores Torres Mateo

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

Lernu nun!

Aprenda agora! Learn now!

Leer nu! Apprenez maintenant!

¡Aprenda agora! Учете сегоа!

Jetzt lerne! Laere nu!

Учите сейча! Studa adesso!

Opi nyt! Esperanto-nie uczyć!

Mokykis dabar! Mācies tagad!

לימדו עכשיו! 今学びなさい!

تعلم الان 现在就学吧!

지금 배우십시오!

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto